

PUTO KAJ PENDOLO¹

DE

EDGAR ALLAN POE.

Impia tortorum longas hic turba furores
Sanguinis innocui, non satiata, aluit.
Sospite nunc patria, fracto nunc funeris antro
Mors ubi dira fuit vita salusque patent.

(Verskvaro verkita por la pordoj de vendejo konstruota sur la loko, kie staris la « Club des Jacobins » en Parizo.)

Tiu longa agonio malfortigis, malfortigis min ĝis morto. Kiam miaj torturistoj, fine min malligis, kiam mi povis eksidi, mi eksentis, ke mi senkonsciĝas. La verdikto, la terura verdikto estis la lasta nekonfuza parolo, kiu atingis miajn orelojn. Poste, la voĉoj de l'inkvizitoroj dronis en la malprecizan zumadon de ia sonĝo, kaj mi nenion plu aŭdis. Sed ankoraŭ kelkan tempon mi konservis la postvidon de terura spektaklo! Mi vidadis, sed kun terura troigemo, la lipojn de la nigre vestitaj juĝistoj, lipojn blankajn kaj mallarĝajn (pli blankajn ol la paperfolio, sur kiu mi skribas tiujn liniojn), maldikajn ĝis strangegeco, maldikajn pro ilia esprimo de severeco, de neŝanĝebla decidemo, de krueleco kaj senkompato pri homaj doloroj. Mi vidis la decidon pri mia sorto elfluganta el tiuj lipoj en formo de mortkondamno. Mi vidis ilin tordatajn de mortiga frazo. Mi vidis ilin formi la silabojn de mia nomo; kaj mi frosttremis, ĉar nenia sono postbruis. Mi ankaŭ, dum teruregaj minutoj de deliro, vidis flirtantaj la nigrajn drapiraĵojn de la ĉambrego. La ses kandelegoj, starantaj sur la tablo, unue ekŝajnis al mi kvazaŭ blankaj kaj graciaj anĝeloj, kompatemaj min savontaj anĝeloj; sed poste morta naŭzo eniris mian

1. Tiu artikolo estis jam tute *kompostita*, kiam, la 13 de Novembro 1906, ni ricevis la numeron de l' 1 de Oktobro de *Lingvo Internacia* entenantan interesan tradukon de l' sama peco, faritan de S^{ro} Alex. Pride. Malgraŭ tiu kurioza koincido, ni tamen publikigas tiun tekston, ĉar : 1^o la traduko de S^{ro} A. Pride estas tute laŭvorta, dum tiu ĉi estas tre libera, 2^o la stiloj de l' du tradukoj estas tre malsamaj. Ni do supozas, ke la komparo de tiuj tiel nesimilaj tradukoj povas esti tre interesa por la komunaj legantoj de ambaŭ Gazetoj.

carbon, kaj mi sentis tremi ĉiun fibron de mia korpo, kvazaŭ mi ektuŝus fadenon de elektra pilaro, dum la anĝelaj formoj ŝanĝiĝis en flamkapajn fantomojn : kaj mi komprenis, ke de ili mi nenian protekton devas esperi.

Penso pri dolĉa entomba ripozo tiam plenigis mian imagon kvazaŭ dia harmonio. Tiu penso venis kviete kaj senskue. La tempo necesa ĝis ĝia plena klariĝo ŝajnis longa; kaj, tuj kiam mia spirito fine sukcesis ĝin senti kaj ĝue akcepti, la figuroj de l'juĝistoj magie malaperis, la kandelegoj estingiĝis, la mallumo densiĝis; ŝajnis al mi, ke mia animo forrapidas al Hadeso.

Kaj la Universo fariĝis nur nokto, silento, senmoveco.... Mi estis svenanta, kvankam ne tute senkonscia; sed mi ne povas diri, kiom restis da konscio. Tamen ĉio ne estis perdita.

Dum plej profunda dormado, dum svenado, dum morto, eĉ en la tombo ĉio ne estas perdita! Alie ne estus senmorteco por homo. Vekiĝante, ni ĉiam disŝiras la teksaĵon de ia sonĝo, kaj tiel rompebla estas tiu teksaĵo, ke post unu sekundo ni jam ne memoras, ke ni sonĝis.

Du sentoj nin ekkaptas dum ekreviviĝo post svenado : la sento pri morala kaj spirita ekzistado, kaj la sento pri korpa ekzistado. Verŝajne estas, ke, se ni povus, kiam revenis la dua sento, memori la impresojn de l' unua, ni konstatus, ke ili elokvente parolas pri la transmonda profundegaĵo. Kia estas tiu profundegaĵo? Kiel distingi ĝiajn ombrojn de la ombroj de l'tombo? Kiu neniam svenis, tiu neniam eltrovas magiajn palacojn, hejmajn figurojn en la kapricaj flamoj de l'fajrejo; li ne rigardados sur la nuboj la melankoliajn kaj vagantajn sonĝaperojn; li ne meditos pri la parfumo de ia nekonata floro; li ne priokupiĝos pri la aŭdado de ia malproksima kaj mistera melodio!

Meze de mia energia penado por retrovi ian postsignon de tiu ŝajne malestanta stato, en kiun enŝoviĝis mia animo, mi iafoje kredis, ke mi sukcesas fiksi miajn memoraĵojn. En la ombroj de mia memoro pri tiu tiel sendaŭra tempo, mi revidas grandajn fantomojn, kiuj silente min forlevas kaj min transportas malsupren — denove malsupren — ĉiam pli malsupren — ĝis kiam maldolĉega kapturniĝo min ekkaptas kun la ideo pri senfina malsupreniĝado. Mi ankaŭ memoras pri konfuza teruro en mia koro, pro la nenatura kvieteco de tiu koro. Poste, mi ekkonscias subitan senmovecon de ĉiuj ĉirkaŭaj estaĵoj — kvazaŭ haltus la fantomoj, kiuj min portas, venkitaj de la enuo pro tiu senfina malsuprenirado.

Tiam mi eksentas ion platan kaj malsekan. Kaj post tio mia *freneziganta* memoro baraktas en abomenindaĵo.

Mi fine rekonsciis la sonon, la movon, kaj mi aŭdis la tumultajn batojn de mia koro. Nun, haltado, dum kiu ĉio malestas. Poste ree sono, movo, palpo, tikla sento, kiu trairas mian korpon. Poste mi certigis pri mia ekzistado; sen ia alia penso. Tiu situacio daŭris longe. Subite revenis la pensado kaj kun ĝi la malfacila penado por kompreni la realecon de mia stato. Poste — forta deziro refali en sensentecon. Poste — la palpento — sukcesa ekprovo de moviĝo — kaj klara, preciza, plena memoro pri la proceso, la nigraj drapiraĵoj, la kondamno, mia malforteco, mia svenado. Jen ĉio. Tuta forgeso pri la resto. Nur pli malfrue mi sukcesis per intensa pripensado malprecize memori, kio poste okazis.

Ĝis tiam mi ne malfermis la okulojn; mi sentis, ke, senigita de ligaĵoj, mi kuŝas dorse. Mi etendis la manon, kiu ekfrapis ion malsekan kaj malmolan. Mi lasis ĝin tie dum multaj minutoj, penante imagi, kie kaj *kio* mi povas esti. Mi malpacience deziris uzi miajn okulojn; sed mi ne kuraĝis, antaŭtimante la unuan rigardon al mia malliberejo. Ne min timigis la vido de malbelegaĵoj; sed mi estis terurata de l'penso, ke mi *nenion* vidos. Fine, kun freneziga korpremo, mi subite malfermis la okulojn. Miaj teruraj suspektoj estis pravigitaj; eterna nokto min ĉirkaŭis. Mi pene spiris sufokata de l'denseco de la mallumo kaj de l'pezeco de l'atmosfero. Mi restis kuŝanta, senmova, kaj mi ekprovis rezoni pri mia situacio laŭ tio, kion mi sciis pri la procedoj de la Inkvizicio. Al mi ŝajnis, ke kelka tempo pasis, de kiam mi mortkondamniĝis; sed ne unu momenton al mi venis la penso, ke mi estas vere mortinta. Tia supozo, malgraŭ tio, kion ni legas en romanoj, estas tute en mal-konsento kun reala ekzistado. Sed, kie mi estas? En kia stato? La kondamnitaj estis kutime bruligataj. — Aŭtodafeo okazis dum la vespero mem de l'tago de mia juĝiĝo. Ĉu oni remetis min en malliberejon por tie atendi la proksiman tiaspecan solenaĵon okazontan post kelkaj monatoj? Tiu supozo ne estis tre verŝajna, ĉar oni kutime tuj rekviziis la necesan viktimaron. Plie, mia unua karcerito, kiel ĉiuj, en kiujn oni ĵetas la mortkondamnitajn en Toledo, estis pavimita per ŝtonoj, kaj la lumo ne estis de tie plene forigita.

Subite terura penso alfluigis mian tutan sangon al mia koro, kaj dum mallonga tempo mi ree falis en svenadon. Kiam mi vekigis, mi ekstaris, konvulsie tremante per ĉiu fibro. Mi freneze streĉis

miajn brakojn super kaj ĉirkaŭ mi en ĉiujn direktojn. Nenion mi palpis, sed mi ne kuraĝis fari unu paŝon, timante, ke mi ekfrapos la murojn de *tombo*. Malvarmaj gutoj da ŝvito perliĝis sur mia frunto. Fine tiu malcerteco fariĝis netolerebla, kaj mi palpe antaŭeniris, trabatante la malplenon per ambaŭ miaj brakoj, elserĉante per miaj larĝe malfermitaj okuloj ian radieton de lumo. Mi faris kelkajn paŝojn; ĉio estis nigra. Mi spiris pli libere; ŝajnis al mi evidente, ke la sorto, kiun oni difinis por mi, ne estis plej abomeninda.

Dum mi daŭrigis mian singardeman paŝadon, mil malprecizaj popoldiroj pri la Toledaj kruelegaĵoj venis en mian menson. Oni rakontis strangajn aferojn pri tiuj karceroj, tiel strangajn kaj tiel terurajn, ke oni nur mallaŭte ilin rediris. Ĉu mi mortos pro malsato? Ĉu sorto eĉ pli abomena estis al mi rezervita? Mi tro bone konis la karakteron de miaj juĝistoj por havi iluziojn pri la kruelegeco de l'speco de morto por mi difinita, nur ĝia maniero kaj ĝia momento min priokupis.

Fine miaj etenditaj manoj renkontis solidan obstaklon — ĝi estis tre glata muro, malseka kaj malvarma. Mi laŭlonge ĝin sekvis plej singardeme; sed tamen mi ne povis tiamaniere ekkoni la amplekson de mia karcero, ĉar la muro ŝajnis tiel unuforma, ke mi povis ĝin tute laŭiri kaj reveni nerimarkite al la forirpunkto. Tiam mi serĉis la tranĉilon, kiun mi portis en mia poŝo dum mia juĝiĝo; sed ĝi estis malaperinta, kaj oni estis interŝanĝinta miajn vestaĵojn kun robo el kruda tolo. Se mi havus tiun tranĉilon, mi enpikus ĝin en fendaĵon de la masonaĵo por marki mian deirpunkton. La problemo tamen estis simplega, kvankam, en la malordo de mia imago, ĝi komence ŝajnis nesolvebla. Mi deŝiris parton el la randaĵo de mia robo kaj tere etendis tiun pecon laŭ ĝia tuta longo perpendikulare je la muro. Mi ne povis, dum mia palpea paŝado, ne renkonti la ĉifonon, finante la ĉirkaŭiron. Tion mi almenaŭ kredis; sed mi ne pripensis pri la amplekso de mia karcero kaj pri mia malforteco. Post kelkaj ŝanceliĝaj paŝoj mi falis. Mia tro granda laceco min decidigis ne releviĝi, kaj baldaŭ dormo min ekkaptis tian, kia mi estis sternita.

Vekiĝante mi trovis, proksime de mia mano, panon kaj kruĉon da akvo. Mi avide trinkis kaj manĝis. Poste mi rekomencis mian vojaĝon tra mia malliberejo kaj fine retrovis, ne sen peno, mian tolpecon. Je mia unua falo mi jam komputis kvindek-du paŝojn; reprenante mian kalkulon, mi plie komputis kvardek-ok ĝis la

ĉifono. Sekve mi entute faris cent paŝojn, kaj, ĉar du paŝoj egalas proksimume unu jardon¹, mi konkludis, ke la karcero havas kvindek jardojn da ĉirkaŭo. La multaj anguloj de l' muro, kiujn mi estis renkontinta, malebligis ĉian juĝon pri la formo de l' kavaĵo; ĉar estis evidente, ke mi estas en subtera kavaĵo.

Kvankam tiu esplorado prezentis al mi malmulte da intereso kaj precipe malmulte da espero, mi tamen ĝin daŭrigis pro scivoloco. Forlasante la muron, mi intencis trairi la ĉirkaŭiritan areaĵon. Mi unue antaŭeniris singardeme, ĉar la planko estis perfida kaj glitiga; poste, plikuraĝiĝinte, mi kun pli da fido min enriskigis, klopodante por kiel eble plej rekte trapaŝi. Sed, post dekduo da paŝoj, mia robo vindiĝis ĉirkaŭ miaj kruroj, kaj mi fortege falis sur la vizaĝon.

Meze de l' malordo de mia falo, mi baldaŭ rimarkis tion ĉi: mia mentono tuŝis la plankon de l' karcero, sed miaj lipoj kaj la supra parto de mia kapo, kvankam pli malsupraj ol mia mentono, estis en la malpleno. Samtempe glua vaporo malsekigis mian frunton, dum mi flaris odoron de ŝimanta fungo. Mi elstreĉis brakon kaj frostremis konstatante, ke mi falis sur la bordo mem de cirkla puto, kies amplekson mi, en mia situacio, ne povis mezuri. Prosperis al mi delokigi ŝtoneton de la masonaĵo kaj ĝin faligi en la profundegaĵon. Ĝi saltadis dum multaj sekundoj sur la muroj de l' abismo kaj poste ekfrapis akvon kun laŭta eĥo. Tuj aŭdiĝis la bruo de pordo, kiun oni malfermas kaj tuj refermas super mia kapo, dum malhela lumradio rapide trapenetris la nokton.

Nun mi sciis, gratulante min pri la hazardo, kiu min savis, kia abomena speco de morto estis por mi difinita. Se, antaŭ ol fali, mi estus farinta unu paŝon pli, la mondo ne plu vidus min. La legendoj, pri la Inkvizio, kiuj rondediriĝis, ne estis ŝercoj — kaj la kondamnitaj povis nur alterni inter la morto kun ĝiaj plej kruelaj korraj suferadoj aŭ la morto kun ĝiaj plej abomenaj moralaj turmentadoj. Tiu ĉi lasta morto estis al mi rezervita. Miaj nervoj, malstreĉitaj pro longa korpremado, tiel ke eĉ la sono de mia propra voĉo min timigis, igis min ĉiumaniere bonega subjekto por tiu speco de torturado.

Mi revenis al la muro decidante, ke mi ne plu moviĝos, por eviti la danĝeron de novaj putoj — ĉar nun mia imago montris al mi putojn ĉie en la mallumo. Eble mi povus mallongigi mian martir-

1. *Jardo*, Angla mezuro de longo.

adon per fina subakviĝo, sed mi fariĝis, malkuraĝa pro troa timego. Plie mi ne povis forgesi, kion mi legis pri tiuj putoj, kies terurega sistemo neniel celis *subitan* finon de vivo.

Post longa malkvietiĝo, mi denove dormetis — kaj denove mi trovis vekigante panon kaj kruĉon da akvo, kiun mi malplenigis per unu sola trinko. Tiu akvo verŝajne entenis ian dormigan drogon, ĉar mi tuj enfalis en profundan dormadon, en dormadon similan je tiu de morto. Mi nescias kiom da tempo daŭris tiu dormado, sed, kiam mi levis miajn palpebrojn, la objektoj ĉirkaŭ mi estis videblaj. Sulfureca lumeto, elvenante el kie mi komence ne sciis, heligis la malliberejon, kies amplekson mi povis konstati.

Mi absolute trompiĝis pri ĝiaj dimensioj; la muroj ne havis pli ol dudek-kvin jardoj da perimetro. Dum kelkaj minutoj tiu fakto naskis en mi mondon da vana malkvieteco; vana, vere: ĉar, kio povus esti malpli grava, en la teruraj cirkonstancoj, kiuj ĉirkaŭis min, ol simple la amplekso de mia karcero? Sed mia animo strange interesiĝis pri bagateloj, kaj mi okupis min pri la eraro, kiun mezurante mi faris. Fine, la vero ekbrilis. Dum mia unua esplora provo, mi komputis kvindek-du paŝojn ĝis la momento, kiam mi falis. Sendube mi estis tiam alproksimiĝinta je unu aŭ du paŝoj al la peco de tolo: la fakto estas, ke mi preskaŭ finis la ĉirkaŭiron de l' kavaĵo. Mi dormadis, kaj vekiginte mi verŝajne returnen paŝis, tiel supozante, ke la perimetro estas preskaŭ la duoblo de tio, kio ĝi reale estis. La konfuzo de mia spirito malhelpis min observi, ke mi komencis la ĉirkaŭiron kun la muro maldekstre, kaj finis ĝin kun la muro dekstre. Mi ankaŭ eraris pri la formo de l'ĉirkaŭmuro. Mi palpe trovis multajn angulojn — kaj el tio mi dedukis ideon pri granda senreguleco. Tiuj anguloj estis nur formitaj per kelkaj sengravaj malglataĵoj neegale interspacigitaj. La karcero estis kvadrata; la muroj nun ŝajnis el fero aŭ el ia alia metalo; ilia supraĵo estis fuŝita per tiuj malbelegaj kaj forpuŝantaj emblemoj, kiujn elpensis la monaĥoj superstiĉaj. Grimacantaj vizaĝoj de demonoj, malplaĉegaj skeletoj malpurigis la murojn de de l'malsupro ĝis la supro. Se la konturoj de tiuj desegnaĵoj estis netaj, la koloroj kontraŭe ŝajnis difektitaj kaj paligitaj de l'malsekeco de l'atmosfero. Tiam mi vidis, ke la planko estas el ŝtono; en la centro troviĝis la cirkla puto, kiun mi evitis, sed kiu estis la sola en la ĉambro.

Ĉion tion mi tre malfacile kaj konfuze vidis — ĉar mia situacio ŝanĝiĝis dum mia dormado. Nun mi estis dorse sternita kaj firme

ligita per rimeno al ligna tre malalta ĉarpento. La rimeno ĉirkaŭvolviĝis kelkajn fojojn cirkaŭ miaj membroj lasante liberaj nur mian kapon kaj mian maldekstran antaŭbrakon, kio tre malhelpis min por kapti la nutraĵon metitan apud mi. Kun teruro mi vidis, ke oni forprenis mian kruĉon. Mi diras : kun teruro, ĉar mi konsumiĝis de netolerebla soifo. Sendube miaj torturistoj decidis eksciti mian soifon, ĉar mia nutraĵo konsistis el tre spicita viando.

Mi turnis mian rigardon al la plafono de mia malliberejo; ĝi estis je tridek aŭ kvardek futoj de l' planko kaj ŝajnis farita el la sama metalo kiel la muroj. Mi rimarkis, en unu el ĝiaj fakoj, plej strangan figuron; ĝi estis bildo de l' Tempo, tia, kian laŭkutime pentras la artistoj, sed kun tiu diferenco, ke anstataŭ falĉilo ĝi tenis objekton, kiun mi unue kredis esti unu el tiuj grandegaj pendoloj, kiujn oni vidas en la malnovaj horloĝoj. Sed tio, kio min pleje atentigis, estis, ke tiu maŝino, ĝuste lokita super mia kapo, ŝajnis agitiĝi. Mi ne eraris, la pendolo balanciĝis kun metoda malrapideco. Mi observis ĝian moviĝon dum kelkaj minutoj, kaj poste, lacigita de tia sensanĝa spektaklo, mi rigardis la aliajn objektojn de l'kavegaĵo.

Baldaŭ kraketo aŭdiĝis — kaj grandegaj ratoj eliris el la puto. Allogitaj de laodoro de l'viando, ili bande supreniris al mi, kaj mi bezonis ĉiujn miajn fortojn por defendi mian pladon kontraŭ ili. Tiu batalado daŭris dum duono da horo, eble dum unu horo, ĉar mi neniel povis juĝi la fluon de l'tempo. Kiam mi relevis la okulojn al la plafono, mi kun terurego konstatis, ke la longo de l'pendolo preskaŭ kreskis je tri futoj; ĝia malsuprenirado estis videbla, kaj ĝia rapido multe pligrandiĝis. Mi ankaŭ rimarkis, ke ĝia malsupra ekstremaĵo estas formita el ŝtala kvaronluno, longa je unu futo de unu korno al la alia kaj tranĉe akriegita kiel razilo. Ankaŭ kiel razilo, ĝi ŝajnis masiva kaj multepeza, grade plidikiĝante de l'malsupro ĝis la supro. Alfiksita al kupra vergo, ĝi *sibante* balanciĝis tra la aero.

Jen do la sorto, kiun por mi rezervis la krulega elpensemeĉo de l' monaĥoj! La oficistoj de la Inkvizicio vidis min, kiam mi evitis la puton — la puton, kies teruroj estis difinitaj por tiel malpia herezulo, kiel mi estis — la *puton*, simbolon de l'Infero, konsideratan de l'famdiroj kiel « Ultima Thule » de ĉiuj punoj; kaj ĉar, laŭ ilia diabla sistemo, ĉiu turmentado devis esti surprizo, ili ne plu intencis min enpuŝi en la puton. Mi estis dediĉita

al nova detrua metodo pli dolĉa, pli dolĉa! Mi duone ridetis en mia agonio pri tia uzado de tia vorto.

Dum kiom da kruelaj horoj mi komputis la vibrantajn balancig-ojn de l'ŝtalo? Ĝi grade malsupreniris al mi, je colo post colo, je linio post linio, ĉiam pli malalta, ĉiam pli malalta! Ĉiu sekundo sajnis al mi jarcento, kaj forfluis tagoj, antaŭ ol mi ekflaris ĝian malagrablan haladzon. Laodoro de l'akrigita ŝtalo enpenetris miajn naztruojn. Mi preĝis al Dio, por ke li pli rapide malsuprenirigu la kvaronlunon, kaj en mia frenezeco mi ekpenis por min levi kaj min tuj oferi al la terura tranĉilego. Poste mi refalis senmova, ridetanta al tiu brileganta morto, kiel infano ridetas al ia multekosta nova ludilo.

Mia sensenteco mallonge daŭris, ĉar, revenante al la vivo, mi ne povis konstati ian malsuprenigon de l'pendolo. Ĉu la oficistoj, kiuj min observadis, mi ne scias de kie, profitis mian svenadon por haltigi ĝian vibradon? Rekonsciiĝante, mi eksentis bezonon de maŭgo, tiel vere estas, ke la homa naturo ĉiam postulas siajn rajtojn, eĉ meze de plej teruraj emocioj. Mi elstreĉis mian brakon tiel malproksimen, kiel mia rimeno ĝin ebligis, kaj mi ekkaptis la reston da viando, kiun al mi lasis la ratoj. Dum mi englutis mian unuan mordajon, senforma penso de ĝojo kaj de espero trapasis tra mia cerbo. Ĝi estis — mi diras — penso senforma kaj nedifinita. Mi sentis, ke ĝi estas penso de ĝojo kaj de espero, sed mi ankaŭ sentis, ke ĝi mortis naskiĝante. Vane mi klopodis por ĝin elfini, ĝin rekapti: tro da suferoj eluzis miajn kutimajn kapablojn; mi estis idiota.

La pendolo agitiĝadis en ebena formanta ortan angulon kun la longo de mia korpo. Mi vidis, ke la akra kvaronluno estas aranĝita tiamaniere, ke ĝi sekcos min en la regiono de l'koro; ĝi skrapos la tolon de mia robo, poste revenos kaj ankoraŭ revenos, ripetante sian mortigan balanciĝon. Malgraŭ la amplekso de la laŭrita kurbo (ĉirkaŭe tridek futoj) kaj la energieco de ĝia malsuprenirado, kiuj sufiĉas por tratranĉi la ferajn murojn mem, ĝi estis reguligita tiamaniere, ke ĝi, dum kelkaj minutoj, nur sensignife kaj supraĵe tuŝetos la teksaĵon de mia vestaĵo. Mi imagis la sonon, kiun okazigos la metala kvaronluno trapasante tra mia robo, la nervan senton, kiun al mi kaŭzos la froteto de l' tolo sur la ŝtalo. Mi meditis pri tiu bagatelo, ĝis kiam miaj dentoj agaciĝis.

La pendolo glitis pli malalten, ankoraŭ pli malalten! Kun sovaĝa plezuro mi komparis ĝian vertikalan rapidon kun ĝia horizontala

rapido. Dekstren! Maldekstren!... Ĝi forflugis malproksimen, malproksimen; poste revenis svingiĝante super mia koro kun bojado de inferulo kaj perfida irado de tigro. Mi alterne ridis aŭ blekis, laŭ tio, se unu aŭ alia ideo superregis.

Pli malalten! pli malalten!... La ŝtalo nun vibris je tri coloj for de mia brusto. Mi fortege ekpenis por liberigi mian maldekstran brakon, kaj al mi nur prosperis ĝin movi de l'kubuto ĝis la mano. Mi povis atingi la pladon metitan apud mi kaj ĝin porti al mia buŝo. Nenion pli. Se mi povus senligigi mian kubuton, mi ekprovus haltigi la pendolon — kio estus kvazaŭ ekprovi haltigon de lavango!

Ankoraŭ pli malalten! neeviteble, fatale pli malalten! Je ĉia vibro mi ellasis ekĝemon, je ĉia balanciĝo mi kuntiriĝis. Mi ĝin sekvis per la rigardo dum ĝia suprenira flugo, poste, konvulsie fermis la okulojn dum ĝia malsupreniro. Certe la morto estus pli milda ol tiu turmentego. Unu sekundo nun estis sufiĉa, por ke malsupreniru je unu grado la aparato rapidiganta al mia brusto tiun brilegan hakilon. Frosttremo min penetris ĝis la ostinterno. Ĝi estis la *espero*, kiu vin akompanas ĝis la eŝafodo, la espero, kiu mallaŭte parolas en la orelojn de la mortkondamnitaj, eĉ en la karceroj de la Inkvizicio!...

Nun dek aŭ dek-du balanciĝoj estis sufiĉaj, por ke la ŝtalo ektuŝu mian vestaĵon, kaj tiu konstato enirigis en mian menson la luman, pripensitan kvieton de la malespero. La unuan fojon, post multaj horoj, mi *pensis*. Mi rimarkis, ke la rimeno, kiu min ligas, estas unupeca. La unua mordo de l'ŝtalo en tiu rimeno nepre ĝin sufiĉe ektranĉos por ebligi, ke mia maldekstra mano ĝin malvolvos. Ĉu la turmentistoj antaŭpensis pri tiu rimedo saviĝi? Ĉu la bandaĝo trairis mian bruston tra la irejo de l'pendolo? Mi min levetis por certigi pri tio; la rimeno ĉirkaŭligis miajn membrojn ĉie *escepte tie, kie pasos la mortiga kvaronluno*.

Sed tuj la ideo de liberigo, pri kiu mi jam parolis, tiu malpreciza kaj nedifinita ideo, kiu unuan fojon elglitis el mia cerbo, kaj kiun mi ekhavis, dum mi portis la nutraĵon al miaj lipoj, denove revenis sieĝi mian menson, nun pli klara, pli konciza, fine tuta! Mi senprokraste ekprovis ĝian plenumon kun la energio de l' malespero.

De kelkaj horoj, la ratoj svarmis ĉirkaŭ la trabaĵo sur kiu mi estis sternita. Maltimemaj kaj glutemaj ili fiksis sur min siajn

ruĝajn okulojn, kvazaŭ ili nur atendus mian morton por min dispecigi. Sendube ili vivis el homa karno funde de l' puto.

Ili jam formanĝis, malgraŭ mia penado, la enhavon de l'plado, kaj, pli ol unu fojon, iliaj akraj dentoj enpikiĝis en la manon, kiun mi etendis por protekti mian nutraĵon. Mi prenis la reston da oleeca viando kaj per ĝi zorge frotis mian bandaĝon. Poste, mi restis senmova, haltigante mian spiron, ŝajnigante min mortinta.

Unue ektimigitaj de mia subita inercio la ratoj forkuris en la puton. Sed, vidante, ke mi ĉiam restas senmova, kaj pro sia manĝegemo, ili revenis, surrampis sur la trabaĵon, kaj flaris la rimenon. Baldaŭ vera armeo min atakis. Freŝaj trupoj eliris el la puto — kaj centoj da ratoj saltis sur mian korpon. La moviĝo de l'pendolo ilin ne timigis; ili evitis ĝian pason, kaj per siaj mil dentoj maĉis la oleitan bandaĝon. Ili svarmegis sur mi, alkroĉiĝis al mia gorgo kaj serĉis miajn lipojn per siaj malvarmaj lipoj. Mi sufokiĝis; abomena naŭzo premegis mian koron, sed mi konsciis, ke, post unu minuto, ili finos sian taskon. Efektive, baldaŭ mi sentis, ke mi estas libera; la rimeno pendis dispecigita.

Ĝustatempe! La pendolo jam estis fendinta mian robon, tranĉinta mian ĉemizon kaj atakis mian bruston per unua balanciĝo. Sed mi estis savita! Per manbato mi forkurigis miajn liberigintojn kaj malrapide oblikve forglitis, min zorge platigante for de l'trafiĝo de l'tranĉilo.

Libera! sed ĉiam sub la potenco de la Inkvizicio! Apenaŭ mi estis farinta kelkajn paŝojn en mia karcero, kiam mi vidis la inferan maŝinon haltanta kaj resupreniranta al la plafono, altirata de nevidebla mano. Ĉiuj miaj moviĝoj estis do spionataj! Kaj mi nur elsaviĝis el kruelega morto por sendube riski ian novan morton ankoraŭ pli kruelegan!

Ĉe tiu penso, mi rulis ĉirkaŭ mi teruratajn rigardojn. Io stranga — ŝanĝiĝo, kiun mi unue ne ĝuste povis juĝi, — okazis en mia malliberejo. Dum mi tion pripensis, mi ekvidis, la unuan fojon, la devenon de la sulfureca lumo, kiu heligis mian karceron. Ĝi devenis de duoncola fendeto, kiu borderis la karceron ĉe l'bazo de l'muroj, kaj tiamaniere ilin tute apartigis de la planko. Vane mi klopodis por rigardi tra tiu fendeto.

Kiam senkuragiĝita mi min relevis, la mistero de tiuj metamorfozoj de l'ĉambro subite fariĝis komprenebla. La antaŭe difektitaj koloroj de la muraj pentraĵoj estis ĵus ricevintaj ian

malpalan brilon, kiu igis la figuraĵojn milfoje pli abomenindaj. La demonoj turnis al mi sovaĝegajn okulojn, en kiuj brilis stranga fajro; ĝi nur povis esti imaga fajro. Mia spirado altiris en miajn naztruojn la vaporon de l'hejtita fero. Netolerebla haladzo disvolvigis en la malliberejo, kaj la okuloj fikse rigardantaj mian agonion fariĝis pli kaj pli flamantaj, dum la malbelegaj pentraĵoj purpuriĝis per sangruĝo.

Mi ne povis plu dubi pri la intenco de miaj turmentistoj. La fera muro estis hejtata de fortega fajro ĝis ruĝiĝo. Spiregante mi foriris malproksimen de l'varmega metalo al la centro de l'karcerero, kie la malvarmeco de l'puto min kvietigis kiel balzamo. Mi kuris al ĝia mortiga bordo. Mi malsupren direktis mian streĉitan rigardon. Luma sfero de l'flama tegmento videbligis ĝian plej intiman profundaĵon. Tamen momente mia menso rifuzis kompreni la signifon de tio, kion mi vidis. Sed fine tiu kompreno faris — batale faris — sian vojon ĝis mia spirito, kaj brule desegnis sin sur mia tremeganta menso. Ho! voĉon por paroli! — Teruro! — Ho! ĉia ajn teruro, krom tiu ĉi! Kriegante mi min forĵetis for de la putbordo kaj enŝovis mian vizaĝon en miajn manojn, malmildege ploranta.

Sed la varmeco rapide pliiĝis. Unu fojon ankoraŭ mi malfermis la okulojn, frosttremante kiel en atako de febro. Dua ŝanĝiĝo okazis en mia malliberejo, tiun fojon ŝanĝiĝo de formo. La ĉambro antaŭe estis kvadrata kaj mi konstatis, ke nun du anguloj estas akutaj kaj sekve du malakutaj. La kontrasto rapide pliiĝis kun basa krakado. En kelkaj minutoj la ĉambro estis ricevinta la formon de lozanĝo. Kaj la aliformiĝo rapidegis. — Cetere mi ne deziris vidi ĝin haltantan. — Mi pli volonte estus alpreminta la ruĝajn murojn al mia brusto por ricevi la eternan pacon! Ĉiaj mortoj ŝajnis al mi mildaj, krom tiu en la puto. Malsaĝulo! mi ne komprenis, ke la puto *estas deviga*, ke tiu puto estas la sola celajo de la varmega fajro, kiu min ĉirkaŭis! La lozanĝo nun platiĝis kun miriga rapideco. Ĝia centro ĝuste koincidis kun la faŭko de l'profundegaĵo. Mi volis malantaŭeniri, sed la muroj kunpremiĝis sur min. Fine venis la momento, kiam brulvundita, eltordita, mi apenaŭ trovis lokon por meti mian piedon sur la planko de l'karcerero. Mi ĉesigis ĉian klopodon eligante longan malesperan krion; mi sentis, ke mi ŝanceliĝas sur la bordo de l'abismo. Mi fermis la okulojn....

Subite mi aŭdis la laŭtan sonon de trumpetoj kaj la basan mur-

muregon de kanono. La flamaj muroj disiĝis. Forta brako ek-kaptis la mian, ĵus kiam mi estis falonta en la abismon. Ĝi estis la brako de l'generalo Lassalle. La Francoj ĵus eniris en Toledon. La Inkvizicio estis venkita.

Laŭ la angla teksto esperantigis

R. C. BOURCARD.
